*Freneza Revuo Esperantista Ŝatanta Observi*

# FREŜO

**N-ro 5 (48)**

**La aprilo 2017j**

*La retrevuo estos senpaga nur por ĉiuj kiuj volas ricevi ĝin*

Aperos ĉiumonate, se sufiĉos por mi firman volon prepari ĝin :-)

**Kwiecien 2017 r.**



**Mi trovis por vi en TTT-ejo**

Se vi volus elŝuti antaŭajn numerojn de "FREŜO"
kaj kontroli nombron da elŝutoj ĝis nun
kaj spekti el kiuj landoj
musklaku unu el subajn ligilojn
aŭ engluu en la ĝustan lokon en retumilo

**https://goo.gl/#analytics/goo.gl/TNJo7O/all_time**
**https://goo.gl/#analytics/goo.gl/TnY1zj/all_time**
**https://goo.gl/#analytics/goo.gl/o6myuE/all_time**

| | |
|---|---|
| FREŜO nr: 1/44 | **https://goo.gl/TNJo7O** |
| FREŜO nr: 2/45 | **https://goo.gl/TnY1zj** |
| FREŜO nr: 3/46 | **https://goo.gl/o6myuE** |

**-------------------------**

*Se vi havus proponojn, materialojn por la venonta numero de ĉi revueto - skribu al mi:*

**fresxo@protonmail.com**
Skajpo: **marianzdankowski**

**Kunlaborantoj:**

*Eduardo KOZYRA*
*Adam FRENSZKOWSKI*
*Franciszek WITUCKI*
*Andrzej GIELERT*
*Mirka KUBICKA*

Recenzoj:
pri "FREŜO" ĉiam atendataj
*Mi petas kritiki -*
*speciale pro gramatikaj eraroj :-)*

*Se vi volus, ke ĉi-tiun belegan revueton ricevadu viaj geamikoj - sendu al mi iliajn ret-adresojn:*

**fresxo@gmail.com**
**fresxo@protonmail.com**


*Ĉefredaktoro:*
**Marian ZDANKOWSKI**
*poŝtel. +48 622 115 650; +48 (0) 604-079-141*

*Adreso: str. Limanowskiego 36 m 3,*
*10-343 OLSZTYN, POLLANDO*
*retadreso:* fresxo@protonmail.com
*Skajpo:* **marianzdankowski**


*Se vi volus instigi min ne nur pervorte (perforte):*

Bankokonto:
(IBAN) n-ro: PL 54114020040000380246602778
Ricevonto: Marian ZDANKOWSKI
Ricevontadreso:10-343 Olsztyn; Limanowskiego 36/3
BIC/SWIFT: BREXPLPWMBK
Bankadreso: BRE Bank S.A. INTERNET BANKING,
al. Pilsudskiego 3, 90-368 Lódz
SORT CODE: 11402004
Konto ĉe UEA: mzda-e

**Grave:**
*mi povas gvidi kvizo(j)n dum via E-aranĝo !*
*Vi kontaktiĝu min rilate al ĉi afero !*









## *Jen diras la Ĉefredaktoro*


*Frivola Revuo Efemera kun Ŝokantaj Obscenaĵoj* **N-ro 5 (48)**

# FREŜO

**La aprilo 2017j** | La retrevuo estos senpaga kiel tipaj retrevuoj | Aperos ĉiumonate, se sufiĉos por mi firman volon prepari ĝin | **Kwiecien 2017**




*Gramatikon mi ne konas kaj gazetojn ne abonas...*
*"ESTAS MI ESPERANTISTO" - Julio Baghy*

## La ĉefredaktoro skribas:

En la nova numero de **FREŜO** estas interesaj tekstoj...

- ekzemple **"Virtuala Vivo"** priskribas okazaĵojn dum fruaj jarcentoj en romkatolika religio, pri kiuj certe ne scias la plej kredantaj katolikoj (kaj estus pli bone, ke ili ne konu!)...

- ekzemple pri forpaso de fondinto de **Esperanta Respubliko**...

- ekzemple pri **"Amikumu"** kiu estas apo (aplikaĵo), kiu helpos vin trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn kaj parolantojn de aliaj lingvoj...

- ekzemple **"La profetoj trompiĝas neniam",** kiu devenas el "La Monde Diplomatique" sed miaopinie ne estas saĝa, ĉar interesiĝi pri profetoj, profetaĵoj kaj pri aliaj mirakloj ne estas saĝa afero...

- ekzemple artikolo de Eugeno Macko el Eŭropa-Demokratio-Esperanto "**Ĉu komencas nova epoko**?" kaj oni devas konsentiĝi kun li... vere, ekde 2001 jaro komenciĝis nova erao, laŭ kalendaro kristana

- ekzemple novelo "**Kial Usono fariĝu JAPANIO**" de Barry Friedman, kiu eble plaĉas por ĉiuj, ĉar ĝis nun estis neniu plendis

Krom tio - kiel kutime: ŝercoj, anekdotoj, enigmoj ktp...

Via Ĉefredaktoro





# LEGANTAJ REAGOJ

Kara Marian,
gratulon pro la nova, fresxa numero de FRESXO ! Mi gratulas, ke vi publikigas ankaux ktitikemajn eldiroj ! Estas tute normale, ke "ankoraux tiu ne naskigxis, kiuj cxiujn kontentigis" ! Memoru ankaux, ke kritiki estas pli facile ol ion fari. Tiu kiu kritikas unue faru ion pli bone !
Laux mia opinio "Esperanto estas por nenio, se ne estas por cxio" !!!Esperanto devas servi same por sxtelisto kiel por policisto, kun Esperanto ni sciu plori kaj ridi, lauxdi kaj ridi, ofendi kaj pardoni, malami kaj ami, peki kaj konfesi....
Oni povas diskuti pri enhavo kaj maniero, sed respodeca redaktoro devas teni gxeneralan direkton, sed gxanerale estas gxusta vojo, por iom ridi kaj rigardi la mondon per aliaj "pli rozaj" okuloj.
Gratulon kaj pluajn sukcesojn !

**Respektplene, Stanislavo Rynduch, Pollando**

Estimata Marian.

Gxojigas min la agado en pola parlamento kaj mi volonte subtenas gxin. Sed mi hezitas respondi je via alvoko, cxar mi memoras kion oni diris pri la sxangxo de sinteno de nobelpremiito Umberto Eco pri esperanto. Mallonge dirite:

***Cxu ne estas risko ke tiujn parlamentanojn inundos el diversaj landoj lauxdoj, kio povus ilin sentigi eble ne nur agrablon?***

Tio estas nur penso kiu trafis min.

Amike vin salutas
Martin Strid

Marian,
Mi dankas sendita revuo Fresco.
Mi legas kun intereso...

**Amike,**
**Rosana Caramez**
**Brazilo**

Kara amiko,saluton!

Ja, mi povas legi " Fresho" en PDF. Do, ghi estas ege interea kaj enhav-richa. Gratulon varman,dume kore deziru ke vi povu dawrigi la eldonadon.

Sincere kaj amike via: Dankon

**Longfei, Ĉinio**

Saluton Marian!
Mi tre dankas pro via klopodo sendi al mi tiun sciigon. Mi deziras peti, bv. sendi la ligilojn de la numeroj de la pasinta jaro 2016 por ankaŭ ilin elŝuti kaj ĝui.
Tre amike,

**MEDINA Juan Carlos Monteros - KUBO**

mi ege shatas vian revuon! dankon!
daurigu tiel !!!
bonshancon!

**Gersi Alfredo Bays - Brazilo**

# Forpasis la fondinto de Esperanta respubliko

**Dum kelkaj semajnoj en 1968 ekzistis artefarita insula ŝtato kies oficiala lingvo estis Esperanto. Laŭplane ĝi devus iĝi turisma celo, sed ĝin rapide detruis la italaj aŭtoritatoj. Nun forpasis ĝia fondinto, Giorgio Rosa.**

Alvenis sciigo pri la morto de la Bolonja inĝeniero Giorgio Rosa (1925-2017), la kreinto de la "Insulo de la Rozoj", artefarita platformo starigita en la Adriatika maro, fronte al Rimini, 400 metrojn ekster la italaj teritoriaj akvoj, kiu la unuan de majo 1968 estis memproklamita sendependa ŝtato kun nomo en Esperanto, "Esperanta Respubliko de la Insulo de la Rozoj".

La "respubliko" elektis kiel sian oficialan lingvon Esperanton, havis registaron, monunuon kaj eldonis poŝtmarkojn. Ĝi tamen neniam estis rekonita de iu ajn lando de la mondo kiel sendependa ŝtato.

**Laŭ artikolo tiutempe** aperinta en la revuo *Esperanto,* Giorgio Rosa komencis plani la fondon de sia insula respubliko jam en 1958, kaj baldaŭ trovis 12 kilometrojn ekster Rimini punkton, kie la maro estas nur 14 metrojn profunda – kaj precize ekster la 12-kilometra teritoria zono de Italio, sekve en internacia maro, kiel asertis Esperanto.

Por financi la konstruadon Giorgio Rosa sukcesis havigi al si la subtenon de ses entreprenistoj, kiuj disponigis la bezonatan kapitalon. Laŭ la supozo de Giorgio Rosa, la artefarita insulo povus iĝi turisma vidindaĵo kaj eble eĉ profita. Same kiel la proksima respubliketo San-Marino, ankaŭ la Esperanta insulo ja interalie povus eldoni proprajn poŝtmarkojn kaj vendi ilin.

La unua versio de la insula respubliko estis detruita de la ondoj jam dum la konstruado en februaro 1965. Tamen la insulanoj ne rezignis, sed daŭrigis la laboron, rakontis la revuo *Esperanto* en 1968:

**Inĝeniero Giorgio Rosa (1925-2017)**



*La sperto estis instrua. La dua provo estis jam pli ambicia: novaj kolonoj el ŝtalo, pli larĝaj ol la antaŭaj, ekstaris firme sur la marfundo, plenaj de cemento. Kiel kapo sur tiuj multaj koloj ekestis larĝa platajo kun solidaj ĉambroj kaj ĉirkaŭa koridoro. La Insulo de la Rozoj jam proksimiĝis al sia definitiva formo. La plano realigata antaŭvidis trinkejon, restoracion, poŝtoficejon, bankon, vendejojn, kiuj estus ĉiuj rekte alireblaj el la ĉirkaŭa promenejo. Tute supre, sur la "tegmento", estus teraso.*

**Jam post la finkonstruo** oni anoncis la insulon sendependa ŝtato:

*La planoj iris rapide antaŭen. Super la nova ŝtato ekflirtis ĝia nacia flago: oranĝkolora, kun tri ruĝaj rozoj kaj tri verdaj steloj sur fono blanka. Valuto estis elektita (nomita "Mills"), moneroj estis fabrikotaj. Poŝtmarkoj, iom amatore presitaj, tuj aperis, kvankam la poŝtoficejo ankoraŭ ne funkciis. Ili estis, tamen, la unua pruvo, ke la ŝtato elektis kiel sian oficialan lingvon – la Internacian.*

Tamen la sendependo ne daŭris longe. Jam kelkajn semajnojn post la deklaro pri nova ŝtato, fine de junio 1968, la itala polico okupis la insulon.

La platformo poste estis detruita de la itala mararmeo, per eksplodaĵoj, inter la 11-a kaj la 13-a de februaro 1969. La restaĵoj dronis nur la 26-an de februaro, pro ŝtormo.

La revuo *Esperanto* raportis pri la sorto de la projekto en tri artikoloj, aperintaj en 1968 kaj 1969.


**Spite la rapidan** detruon de la sendependa insulo, restis spuroj de ĝi en la itala kulturo. En 2012, Walter Veltroni (i.a. eksa urbestro de Romo) publikigis romanon, L'isola e le rose ("La insulo kaj la rozoj"), libere inspiritan de la eventoj.

La 17-an de decembro 2016 estis inaŭgurita en Pian di Macina, Pianoro (Bolonjo) la sidejo de la kultura asocio Isola delle Rose – Insulo de la Rozoj, kun la projekcio de la filmo L'isola delle Rose – La libertà fa paura ("La insulo de la Rozoj – libereco timigas"). La filmo spekteblas en Youtube kun esperantlingva teksto.

*artikolo el "Libera Folio"*
*http://www.liberafolio.org/*

# POLITIKA VIVO



Se vi pensas, ke oni ne manipulas vin, signifas, ke vi estas en la manoj de profesiuloj




Juna paro el Okcidenta Berlino grimpas la muron, por knabino povus paroli al ŝia patrino, kiu postrestis sur la flanko okupita de la sovetiaj






Dum la Dua Mondmilito, la reĝa paro rifuzis forlasi Londonon, kvankam tiutempe multaj loĝantoj serĉis trankvilecon ĉe kamparo.
Reĝo Georgo kaj Reĝino Elizabeth ne volis forlasi la ĉefurbon eĉ dum la Batalo de Britio en 1940, kiam okazis la intensa bombado de la urbo.
La reĝa paro vizitis hospitalojn, bunkrojn kaj ruinojn de la detruitaj domoj, kie konsolis loĝantojn.
Ilia konduto substance pliigis la moralon de londonanoj kaj helpis postvivi la plej malbonan periodon de la milito.




Popolamasa psikologio

# ANEKDOTA VIVO

**Malsanulejo, operacisalono,** prostatoperacio.
Kuracisto ordonas:
- Fratino, korektu penison... jes...tre bone… kaj nun por paciento**.**

**Alvenas ulo al kuracisto kaj** alparolas:
- Sinjoro doktoro, hepato min doloregas!
- Ĉu vi drinkas vodkon? - demandas kurcisto
- Jes, mi drinkas, sed tio ne helpas.

**- Halo, ĉi tie parolas Kowalski.** Sinjoro doktoro, tuj alvenu, mi petas, ĉar mia edzino havas fortan atakon de apendico!
- Trankvilu sinjoro Kowalski. Antaŭ du jaroj mi certe eltranĉis apendicon de via edzino. Ĉu vi aŭdas iam pri tio, ke iu havus du apendicojn?
- Kaj ĉu vi aŭdis, sinjoro doktoro, ke ĉe homo povas aperi la dua edzino?

**Alvenas paciento al kuracisto:**
- Sinjoro doktoro, hundo ekmordis min.
- Kaj la hundo estis furioza, rabia?
- Nuu..., certe kontenta ĝi ne estis.

**Alvenas kun sia edzo virinaĉo al la** kuracisto. La terapiisto pririgardas ilin kaj diras:
- Via edzo suferas nervodomaĝon. Li bezonas trankvilecon.
- Ho, vidu sinjoro, mi tion diradas al li almenaŭ centfoje tage.



**Kuracisto rigardas priskribon de** malsano de pacientino kaj diras:
- Ho, vi ne plaĉas al mi, ne plaĉas…
- Sinjoro doktoro, vi ankaŭ ne estas la plej belvizaĝa.

**- Sinjoro doktoro, doloras min** artefaritaj dentoj, kiuj vi enmetis por mi.
- Mi ĝuste diris, ke ili estos kiel naturaj.

**Al hospitala salonego eniras ulo:**
- Kiun oni esploradis la 20-an, marde?
- Min! – unu paciento diras.
- Kia estas via alteco?
- Unu metro kaj sepdek centimetroj.
- Nu, bone! – ulo respondas kaj eliras.
- Sinjoro doktoro, kia estas mia esploradrezulto – vokas paciento.
- Mi ne estas terapisto, mi estas lignaĵisto.

**Alvenas virinaĉo al kuracisto:**
- Sinjoro doktoro, mi dankas pro la zorgema kuracado.
- Sed mi sanigadis vian edzon, ne vin, sinjorino.
- Jes, jes, sed mi ĉion heredis post li.

**En Ukrainio oni demandis sin**, kion planti ĉirkaŭ Ĉernobilo.
- Betojn.
- Ne, ĉar bovinoj mortos.
- Do, eble terpomojn.
- Ne, ĉar homoj veneniĝos.
- Ni plantu tabakon kaj sur la cigaretpakaĵoj ni skribu: “Ministro pri sano avertas lastfoje”.

(fw)



# VIRTUALA VIVO (1)

**II jarcento** - Oni malkovris „beatan/sanktigitan” akvon. Aperas unuaj mencioj pri metodoj sanktigi ĝin kaj ĝia uzo por „forpelado de fantomoj”.

**II jarcento** - La sankta Klemenso el Aleksandrio surpaperigas siajn opiniojn: „Ĉiu virino devus estis plenigita per honto jam pro nur pensado pri tio, ke ŝi estas virino”.

**La jaro 178** – La romia filozofo Celsus atestas falsadon kaj modifikadon de evangeliaj enhavoj, kiuj laŭ lia opinio plu estas plenaj de antitezoj. (Oni preskribadis kaj ŝanĝadis la Sanktaj Skriboj kaj forigadis el ilia origina enhavo ĉion, kio permesadis al reviziantoj rifuti kritikon) [Alethes logos/Oygenes]

**III jarcento** - Estas establita „spirita stato”/pastraro. Oni dividis kristanoj en du partoj – pastraro kaj laikaro. Antaŭe ĉiuj kristanoj estis samrangaj, estinte samtempe kaj pastroj kaj adeptoj.

**III jarcento** – Ĝis la tria jarcento disĉiploj de kristianismo ne sciis pri eterna virgeco de Maryja. Evangelio de Mateo informas, ke Jozefo „ ne proksimiĝadis al Maryja ĝis kiam ŝi naskis filon”. „Proksimiĝo” en Biblio signifas la sekskuniĝon. (La fakto de la sekskuniĝo de Jozefo kaj Maryja post la nasko de Jesuo estos evidenta por ĉiu, al kiu la religiaj dogmoj ne malpermesas logike konkludi).



La jaro 220 – Oni akceptis dogmon pri nepreco plenumi certajn aliajn ekleziajn farojn, necesaj por savo. Bapto evidentiĝis nesufiĉa.

**La jaro 250** – Oni enkondukis instruon pri eternaj turmentoj.


**IV jarcento** – La sankta Aŭgusteno (la kreinto de la unua filozofia doktrino de la katolika eklezio) instruas, ke sklaveco estas stato kongrua kun la naturo (kontraŭe ol la romiaj juristoj kaj pensiuloj) kaj konvinkas kristanajn sklavojn, ke ilia situacio estas kongrua kun Dia volo. Samtempe admonas la „neinformitajn” liberajn kristanojn, kiuj bazas sur Malnova Testamento, kiu antaŭvidis liberigon post ses jaroj de sklaveco). Al bonstatuloj diras pri la pasanta utileco de Eklezio, kiu tiamaniere influas konsciencon de sklavoj.(In Psalmos 124,7).

**IV jarcento** – Komenco de la periodo murdi paganojn kaj rabadi iliajn templojn fare de kristanoj, instigataj de episkopoj, abatoj kaj monaĥoj. En la jaro 347 la patro de eklezio Firmicius Maternus instigas la regantojn: „Por ke la fajro de monfarejo aŭ flamo de la metalurgia forno fandu statuojn de iliaj diaĵoj; prenu kiel vian propraĵon ĉiujn dankdonacaĵojn” Post la ruinigo de temploj vin altigos Dio.

**La jaro 312** – Batalo ĉe la Mulvia Ponto (Pons Mulvius- latine) dum kiu la imperiestro Konstanteno venkis kaj mortigis Maksencjusz. Pro dormvizio, kiun la imperiestro havis antaŭ la batalo (ke la venko li dankos al simbolo de kruco), unu jaron pli poste li establis edikton laŭ kiu la kristana religio ricevis saman rangon kiel la paganaj. La kristianismo fariĝas unu el la ŝtataj religioj de Romio. Formiĝo

iru al la paĝo 8


Aura - Leonid Afremov




el la paĝo 7

# VIRTUALA VIVO (2)

de la Institucia Romkatolika Eklezio. Komenco persekutoj kaj murdoj de disĉiploj de aliaj konfesioj.

**La jaro 314** – Oni rezoluciis pri anatemo por dizertuloj. Ĝis tiam la kristanaj eklezioj malpermesadis morti eĉ dum sindefendo.

**La jaro 319** – La imperiestro Konstanteno establis leĝon, permesanta al pastraro ne pagi impostoj kaj ne militservi.

**La jaro 321** – La romia imperiestro Konstanteno ordonas dimanĉon kiel festotagon anstataŭ ĝis nun festata sabato.

**La jaro 325** – La imperiestro Konstanteno dum koncilio en Nico establas kanonon de la „sankta" kaj la „sanktan duopon" , rangaltigante Jesuon kiel Dion. Rezulte de balotado fare de 250 episkopojn, provokitaj per instruoj de la pastro Arrio el Aleksandrio (kiu asertis, ke Jesuo ne estas Dio, nur dijaĵo de malpli alta signifo) oni akceptas, ke Jesuo kaj Dio, kiu lin sendis estas la sama estaĵo. Oni enkondukas kredon je la Santa Duopo. Jesuo el Betleemo anstatŭos adoratan ĝis nun dion Mitra. Ĉielenpreno de Mitra en printempa solstico fariĝas de nun la kristana festo – Pasko. Naskiĝo de Jesuo (la sesan de januaro) por forigi konkurantan Mitra estas ŝovita al 25a de decembro (naskiĝtago de Mitra). En Romo sur la Vatikanaj Montetoj kristanoj transprenas la sanktan kavernon de Mitra, igante ĝin sidejo de la katolika eklezio ( la pliposta Laterano). Novaj preĝejoj estas konstruitaj sur la kultolokoj de Mitra. (Subterajn sanktejojn de Mitra oni povas nun viziti inter alie sub la preĝejo Santa Prisca kaj San Clemente). Klaraj similecoj de



kristianismo al mitrismo la kristanaj ekleziuloj klarigas kiel agado de diablo. Bazo de la Mitra-kulto estis kredo pri senmorteco de animo kaj 10 ordonojn, similaj al la judaj ordonoj. Por Mitra oni oferis panon kaj vinon aŭ akvon (ankaŭ bestoj) kaj liaj disĉiploj estis ligitaj en komunumoj, gvidataj de patroj. Kontraŭe ol kristanoj la disĉiploj de Mitra ne opiniis sklavecon kiel staton kongruan kun la dia volo, sed kiel rezulton de perforto.

**La jaro 330** – Enkonduko de kutimo honori forpasintoj („sanktuloj") kaj iliaj relikvoj. La unuan solenaĵon omaĝe al „Ĉiuj Sanktuloj" inicis eklezio en Antioĥio.

**La jaro 355** – Episkopoj estas forprenitaj de sub la sekulara jurisdikcio.

**La jaro 357** – Romo enkondukas imposton de la liberigataj sklavoj. Responde al tio episkopoj anoncas malpermeson liberigi sklavojn, kiuj estas posedaĵo de la eklezio. Pastroj plu promesas por sklavoj feliĉan vivon en transmondo, sed tion povas ricevi nur tiuj, kiuj estas obeemaj kaj subiigitaj. Punoj por malobeemaj sklavoj antaŭvidis Revelacio de Petro (en II kaj III jarcento opiniata fare de kristanoj kiel kanona skribo), kiu antaŭvidis, ke tiaj (malobeemaj) „estos ĝene mordi la proprajn langojn kaj suferi pro eterna fajro" (Ap.P 11). Ankaŭ instruo de dek du apostoloj instruas sklavojn, ke ili traktu la proprietuloj kiel Dion mem kaj ke ili montru al ili siajn „humilon kaj timon" (Didache 4,11).


*(Originala titolo:*
***"Kion ne scias romkatolikoj..."*** *-*
*tradukis db)*

# VERDA VIVO











Josefo Branko Zbukvic



Praga Malnova Strato ~ Jurio Ŝevĉuk

# POLITIKA VIVO

**Rumanaj protestoj**

Malgraŭ ŝanĝoj en la leĝo de (anti) - korupteco ne haltas rumanaj protestoj postulantaj demision de la registaro kaj ŝanĝon de la stilo de ŝtat-konduko. Dekoj da miloj da manifestaciantoj kolektiĝis en Budapeŝto kaj en aliaj urboj (Cluj, Sibiu, Iasi, Timisoara).

*Ni esperas, ke la tumultoj ne influos negative en Rumanio al libermerkataj decidoj de lokaj aŭtoritatoj, inkludante la granda redukt-imposto.*

**Estas laboro!**

Laŭ taksoj de la Usona Departemento de Hejmlanda Sekureco, la muro sur la limo kun Meksiko kostos pli ol $ 21 miliardoj kaj lia konstruo prenos preskaŭ la tuta oficperiodo de Donald Trump. La konstruo de la muro laŭ la limo pli ol 3 mil. km estis unu el la ĉefaj sloganoj de la kampanjo, kaj la dekreto pri ĝia konstruo - unu el la unuaj, kiuj subskribis nova prezidanto. Bontenado de la konstruaĵo povas kosti $ 700 milionoj jare, kaj ankaŭ granda elspezo por aldona dungado de limgardistoj.

*Prezidanto Trump promesis vivigi la internan merkaton kaj promesis laboron por la usonanoj. Nu, estas kaj investo kaj laboro.*



**Pro malriĉeco ...**

Laŭ la Associated Press, Venezuelo por la unua fojo estis en la unua loko inter la landoj kies ŝtatanoj petas azilon en Usono, sed ĝi ne estas rezulto de politika persekutado, sed mizero. Lando de kelkaj jaroj estas en la krizo, kaj la ekonomio de ĉi tiu lando sub la regado de Hugo Chávez kaj lia posteulo Nikolao Maduro de kelkaj jaroj dependas de vendoprofitoj de kruda petrolo. La prez-malkresko de petrolo kaŭzis gravan ekonomian krizon, pro inflacio en la vendejoj mankas la plej bazaj varoj kaj medikamentoj en hospitaloj.

*Tiel finiĝas la konstruon de la socialismo en Venezuelo ... sed... ŝtatanoj mem elektis sian registaron... Hugo Chávez eĉ kelkfoje estis elektita kiel prezidanto de Venezuelo.*

**Specialaj servoj ...**

La estraro de usonaj sekret-servoj detranĉis Blankan Domon de la parto de sekretaj informoj pro la timo ke ilin ne akiru la rusoj, ĉar Donald Trump kaj lia teamo havas longan historion de suspektoj pro kontaktoj kun la rusoj. Multaj de ili, ĝis nun nekonfirmitaj, nun aperiĝas en la lumo, inter aliaj okazaĵoj kaj asertoj enhavitaj en la dosiero Christopher Steele. Aparta esploro estas efektivigita ankaŭ rilate al liaj iamaj konsilantoj dum la elektokampanjo.

*Ĉu Prezidanto Tramp batalas kontraŭ sekret-servoj ? Nune ?*

# ARMEA VIVO

















Venetian Annelies Clarke



3 Bricole - Anneliese Clark



**"La 07-an de aprilo 2017j Pola Sejmo (Parlamento) per aklamo akceptis la rezolucion pri la memorigo de Ludoviko Zamenhof okaze de la 100-a datreveno de lia morto. S-ino Anna Wasilewska (parlamentanino el la urbo Olsztyn) kiel Prezidantino de la Parlamenta Grupo de la Lingvo Esperanto preparis la projekton de la rezolucio."**

(Interese: S-ino Wasilewska ne estas esperantistino)

Jen la ligilo al la ĝusta retpaĝo de retpaĝaro de Pola Parlamento:
http://www.sejm.gov.pl/sejm8.nsf/komunikat.xsp?docmentId=C46335BE3AC0AB56C12580FB0033454D

Kompreneble retpaĝ(ar)o estas en la pola lingvo sed vi povas ĉion kompreni, se vi engaĝos Google-an Tradukiston por traduki ĝin.
Se vi opinias menciitan rezolucion grava - sendu gratulon kaj dankon al subaj retadresoj de aliaj anoj de Parlamenta Grupo de la Lingvo Esperanto. Vi sciu nur ke anstataŭ " (cxe) " vi devas enskribi " @ "

- Anna.Wasilewska(cxe)sejm.pl - Prezidantino
- Krzysztof.Truskolaski(cxe)sejm.pl - Vicprezidanto
- Andrzej.Maciejewski(cxe)sejm.pl
- Pawel.Bejda(cxe)sejm.pl
- Anna.Bialkowska(cxe)sejm.pl
- Piotr.Cieslinski(cxe)sejm.pl
- Tomasz.Cimoszewicz(cxe)sejm.pl
- senator(cxe)Czarnobaj.senat.pl
- Grzegorz.Furgo(cxe)sejm.pl
- Tomasz.Kucharski(cxe)sejm.pl
- Katarzyna.Osos(cxe)sejm.pl
- Michal.Stasinski(cxe)sejm.pl
- Elzbieta.Stepien(cxe)sejm.pl

Oni proponas skribi dankon (gratulon) en via gepatra lingvo aŭ en Esperanto aŭ en la pola (kun helpo de Google-a Tradukisto) aŭ en tri menciitaj lingvoj.

Se vi intencas sendi nur UNU leteron por ĉiuj parlamentanoj, memoru enŝovi nomojn en la linio BCC (kaŝitaj adresatoj).

Marian ZDANKOWSKI

*Kara Marian,*

*Gratulon! Mi sendas kopie al nia brita retpoŝta grupo. En 1972 mia grupo iniciatis kaj organizis la Esperantan Parlamentan Grupon en Britio, kiu jam post la unua nacia balotado de 1974 gajnis la plimulton de la malsupra ĉambro por la Esperanta Parlamenta Grupo. Mi tiutempe dissendis nacian gazetaran bultenon por diri, ke la Esperantistoj konsistigas la plej grandan grupon en la parlamento, do gajnis la ĝeneralan balotadon! Eĉ la ĉefministro, Harold Wilson estis esperantisto, kiu jam lernis la lingvon kiel skolto.*

*Sed por prepari la Esperantistojn por tiu kampanjo mi iniciatis informkampanjojn interne de la Esperanto-asocio. Unue ni devis konvinki Esperantistojn, ke estas tute akcepteble premagadi inter politikistoj, kondiĉe ke ni ne montras favoron al unu politika partio pro aliaj kaŭzoj. La alia estis por persvadi al la Esperantistoj ne peti al politikistoj lerni la lingvon. Mi argumentis, ke cent horoj de la tempo de parlamentano en la parlamento valoras multe pli ol cent horoj uzataj por lerni la lingvon. Nia slogano ne estu 'Lernu Esperanton!' sed 'Instruu Esperanton!'. Surbaze de tio ni gajnis la sukcesojn.*

*Esperantisto estas homo kiu subtenas la Esperantismon, ĉu aŭ ne li scipovas la lingvon. Sed pli kaj pli la movado estas puŝata al la ideo, ke Esperantisto estas persono kiu parolas la lingvon, ĉu aŭ ne li subtenas la Esperantismon.*

*Vi skribis: "S-ino Wasilewska ankoraŭ ne estas esperantistino". Ŝajnas al mi ke ĝuste tio ŝi ja estas ;-)*

*Daŭrigu la bonan laboron. Dum la britaj Esperantistoj dormas, la polaj aktivas.*

*Kore salutas Ian Fantom*





OBMITs
5952-6764
NATALIA
SPIVAK

Rebriloj kaj ombroj - Igor Sava






**"Amikumu" estos apo (aplikaĵo), kiu helpos vin trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn kaj parolantojn de aliaj lingvoj.**

Amikumu estas plursistema aplikaĵo por saĝtelefonoj (Android kaj iOS) per kiu oni povas trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn aŭ parolantojn de aliaj lingvoj. La aplikaĵo funkcias dumaniere. Oni povas trovi proksimajn esperantistojn per listo aŭ per mapo. La aplikaĵo lanĉiĝos en aprilo 2017.

Amikumu lanĉis monkolektadon ĉe Kickstarter je la 18-a de oktobro 2016 de la esperantistoj Chuck Smith kaj Evildea. Pli ol 3000 eŭroj estis kolektitaj en la unuaj 10 horoj post la komenco de la monkolekto. La celo de la monkolekto estis 8500 eŭroj. La celo estis atingita post 27 horoj. La kampanjo daŭris ĝis la 16-a de novembro 2016.

**=-=-=-=-=-=-**

*Al la demandoj respondas* **Xu Jie**, *la nova merkatikisto de "Amikumu":*

**Laŭ diversaj mencioj en la reto eblas konkludi, ke Amikumu jam serioze progresas kaj estas iom uzata, kvankam la aplikaĵo ankoraŭ ne estas oficiale lanĉita. Ĉu vi povus rakonti iom pri la nuna stato de la aferoj?**

-Malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj, ni multe progresas solvante problemojn kaj teknologiajn kaj neteknologiajn. En marto, ni lanĉetis la beta-version por niaj testantoj, kiuj helpas nin trovi cimojn kaj ankaŭ doni sugestojn. Ĉimonate, Amikumu nepre debutos por ĉiuj esperantistoj. Fakte, la apo estas jam plejparte preta – ni simple plibonigas ĝin kaj forigas la restantajn cimojn. Se oni volas tuj informiĝi pri la oficiala lanĉo de Amikumu, mi forte rekomendas, ke oni vizitu nian retejon: www.amikumu.com kaj aliĝu al nia retpoŝtlisto por ricevi mesaĝon.

– Same pasintmonate ni sukcese debutigis nian retejon en dek du lingvoj. Tio ne povas realiĝi sen la helpo de niaj lingvoambasadoroj. Se oni volus fariĝi ambasadoro de sia lingvo, kontaktu nin. Krome ni oficiale registras la firmaon (en Aŭstralio) kaj plene tradukis ĉiujn jurajn dokumentojn al Esperanto, ĉar Esperanto estas nia labora lingvo. Tio kaŭzis multe da amuzo por nia advokato!

**La provversion de via aplikaĵo uzas proksimume 350 homoj diversloke en la mondo, kaj ili ĉiuj estas esperantistoj. Kie troviĝas la plej multaj testantoj? Kial ili ĉiuj estas esperantlingvanoj, kvankam via aplikaĵo celas atingi ankaŭ aliajn komunumojn?**

– Nuntempe ĉiuj 350 testantoj estas esperantistoj, kiuj loĝas tre dise tra la tuta mondo. Laŭ niaj statikistoj, la plej multaj testantoj troviĝas en okcidenta Eŭropo. Esperantistoj kaj esperantaj organizoj estas niaj ĉefaj subtenantoj. Ĉiuj teamanoj en Amikumu estas esperantistoj, ni laboras kaj komunikas ĉiutage per la zamenhofa lingvo. Unuvorte, esperantistoj estas nia kerna uzantaro kaj subtenantaro. Estonte, kiam Amikumu sukcesos en Esperantujo, pri kio mi ne dubas, ni malfermiĝos por alilingvanoj. Ni kredas, ke tiam Esperantujo multe profitos pro Amikumu. (-)

*La tutan interviuon vi tralegu*
*en "Libera Folio" ĉe*
*http://www.liberafolio.org/*

# La profetoj trompiĝas neniam

En Lake City (en la usona ŝtato Minnesota), iam septembre en la 1950-aj jaroj, la Lake City Herald publikigis **artikolon pri profetaĵo** de Maria Keech : la urbo, same kiel aliaj usonaj lokoj, estus detruota per ondego, sed la kredantoj estus savotaj de eksteruloj venantaj en fluganta telero el la planedo Klariono. La mondfino estis prognozita por la 21-a de la sekvanta decembro. Tiu miljarisma atendego partikulariĝis pro tio, ke ĝi estis kontrolita de skipo de socio-psikologoj, kiuj, el samtempa observado de la malvarma milito, intencis klarigi la universalajn mekanismojn de profetaĵoj, ekde la kristanismo ĝis nun.

La atendego estis vana, kaj la disĉiploj trovis bonajn kialojn por la **malsukceso de la profetaĵo.** La observantoj identigis samajn reagojn kiel tiujn malkovritajn ĉe malnovaj miljarismaj sektoj, pri kiuj la informoj estis malabundaj.

La millerismanoj, disĉiploj de William Miller, farmulo de Nova Anglio kiu kredis je la laŭlitera plenumiĝo de la **biblia profetaĵo**, atendadis tute tra la jaro 1843, sen rezigni ĝin : « Finiĝis la jaro de la mondfino. La millerismo pluis. La hezituloj senkuraĝiĝis, sed ili malmultis ; tiuj estis multaj, male, kiuj plu tenis sian fidon kaj fervoron. Ili atribuis sian disreviĝon al ajna kalkula eraro. Malgraŭ la malsukceso de la profetaĵo, la fajro de fanatikeco intensiĝis. Flamoj de tiuspeca emocio ne estingiĝas pro ordono. (...) Anstataŭ malkreski sub sprono de malsukceso, la eksterigoj de lojaleco iĝis ankoraŭ pli rezolutaj ĉe la atendo de la tute baldaŭa lasta juĝo.

Kiel verkintoj de **Malsukceso de profetaĵo,** Leon Festinger kaj liaj kolegoj evidente pensis pri la precipa peco en la originoj de la katolika eklezio, organizita el frustrata atendego de la glora kaj rapida reveno de Kristo por la lasta juĝo.

Kiam la **profetaĵo malsukcesas**, la kredantoj, do, ne nepre forlasas siajn senvalidigitajn kredojn : tial, ĉar la formetado de sia fido tro multekostas, ili reagas, male, kun ekstra engaĝiĝo. Ili povas tiam elpensi ĉiajn artifikojn koncerne la eventodaton - iliaj taksadoj estis eraraj - , persvadi sin pri tio, kaj intensigi sian piecon klopodante pli ol iam ajn konvinki la aliajn. Laŭ Festinger, tiu konduto paradoksa, se ne diri neracia, klarigeblas per « kogna disonanco », morala kaj intelekta malkomforto tiel doloriga, ke la realo devas cedi antaŭ la kredo.


Ekzistas tamen aliaj konvinkokampoj, kiel la politiko, al kiu la franca antaŭparolinto sin turnas anoncante, ke la libro prilumas « niajn reagojn al laikaj kaj politikaj profetaĵoj okupantaj plurajn generaciojn ekde 1917 [2] ». La dato de la sovetia revolucio subparolas pri kiom da atento la liberala pensulo Serge Moscovici dediĉis en sia menso al la tezoj de Raymond Aron pri « sekularaj religioj », formulitaj sammomente kiel la verkoj pri kogna disonanco. En La opio de la intelektuloj, Aron atakis la komunismon, politikan ideologion, kiu, laŭ li, konsistigas, sub sciencaj ŝajnoj, religian kredon tute sorbiĝintan de sav-esperoj. Ĝiaj adeptoj, li substrekis, manifestas obstinan rifuzon pri la plej kulpatestaj veroj, kiel la diktatoreca naturo de la stalinismo aŭ la malriĉeco de la sovetia socio**.**

La sociologo, profesoro La sociologo, profesoro kaj ĉefartikolisto ĉe Le Figaro, tiel atingis du celojn per sola frapo : li reguligis siajn kontojn kun siaj eksaj kamaradoj, simpatiantoj de la komunista partio, kaj, meze de la malvarma milito, li utiligis la kontraŭkomunismon de sia politika familio. Sed, kial la komunistoj estintus solaj iluziiĝi ? Kiam Aron asertas, ke « la senklasiĝinta socio enhavanta socialan progreson sen politika revolucio samvaloras kiel la miljara regno revata de miljarismanoj », kiel ne vidi, ke la religia difino de la komunismo aplikeblas al aliaj ideologioj ? Tamen, la akuzanto tuj ekskluzivis tiun eblon : li elvokis siajn rilatulojn, la liberalistojn, kiel tiujn, kiuj dubas kaj havas nenian dogmon...

*aŭtoro Alain GARRIGOU*
*tradukis Jacob Hasbun*

*La tutan artikolon en*
*"Le Monde diplomatique"*
*http://eo.mondediplo.com/article1486.html*

*Ndlr.:* ***Ĉu estas senco skribi, analizi profetaĵojn, miaklojn kaj aliaj ne-sciencajn sensencaĵojn; ĉu estas senco skribi ion ajn pri nenormalaj homoj??****?*






# POLITIKA VIVO

**Irlandaj fotoradaroj**
Mi scias, ke tio aŭdiĝas kiel fabelo, sed irlanda polico ĉiutage enlokigas informojn en sian interretan paĝon pri lokoj kie estos instalitaj fotoradaroj, ĉar ĉi tiuj fotoradaroj estas bezonataj por plibonigi de sekureco kaj por atentigi ŝoforojn pri lokoj malsekuraj - sed ne kun intenco por tiri monon el la poŝo de ŝoforoj.

**Irlanda fisko**
En Irlandujo al unua kun miaj konatuloj telefonis antaŭ nelonge fiska ofico:
„Sinjoro, ni kontrolis nune vian impost-deklaron, kaj mi volas informi vin, ke vi pretervidis, ke vi havas malpezigon. Kaj ni tre, vere tre pardonpetas vin, sed preskriboj de leĝo estas tiaj, ke ni povas al vi repagi malpezigon nur por lastaj kvin jaroj”.
Post kelkaj tagoj en letera kesto de mia konatulo troviĝis ĉeko el fiska ofico je la kelkaj mil euroj.

**Germana suvereneco**
Interese estas ke germanoj, principe, subskribas nenion, kio iel, almenaŭ vere simbole submetigas al institucioj ne-germanaj, ekzistantaj eksterlande.
Kaj kiam enfiksis restrikton de nacia suvereneco al „eŭropa konstitucio”, tiam Germana Konstitucia Tribunalo por ĉiuspeca de okazo por futuro prijuĝis, ke ĉi tiuj sentencoj en Germanujo ne devigas. Tial ke en Germanujo tio ĉi germanaj sentencoj estas „super ĉio”, kaj ne ia ajn uniaj aŭ internaciaj institucioj.




**Eksa ĉefestrino de opozicio** en Sud-Afriko, Helena Zille, estis disciplinita fare de la propra partio – Demokratia Alianco – pro anonco sur ***Twitter***, kie ŝi konstatis, ke la heredaĵo de koloniismo ne ĝis la fino estis malbona por la lando.
Eksĉefestrino sobre konstatis, ke la juĝsistemo, transporta infrastrukturo kaj akvoduktaj sistemoj estas postkoloniisma restaĵo, kion oni ne povas kalkuli kiel malbono. Tiu enskribo kaŭzis lamentadon de la publika opinio kaj la aŭtorino de la enskribo akuzita pri reaktivigo de la rasaj diferencoj en la lando.
La politikistino pardonis pro sia eldiro, kio tamen ne protektis ŝin antaŭ kritiko de la partiaj altranguloj.

**Japania sentenco**
Juĝtribunalo en Maebashi agnoskis, ke registaro de la Lando de Floranta Ĉerizo respondecas pri avario de nuklea centralo en Fukushima en 2011. Laŭ opinio de la juĝtribunalo, la registaro povis devigi operatoron de la nuklea centralo, la firmaon TEPCO, por ke tiu observu konvenajn normojn de sekureco. Samtempe oni devigis la registaron pagi rekompencon por 137 personoj, kies sumo estis 38,6 milionojn da jenoj (1,4 milionoj da zl). Tiuj personoj estis devigitaj post la katastrofo forlasi siajn loĝlokojn kaj akuzis la registaron. Post la avario en Fukushima siajn domojn devis forlsi ĉirkaŭ 80 milojn da personoj.

**Kondomoj en Parlamento**
Germanaj paklamentanoj akceptis regulojn, kiuj malpermesas seksumi sen kondomoj kun prostituitinoj.
La posedantoj de bordeloj devos informi klientojn pri la novaj reguloj.
Celo de la ŝanĝoj estas protekto de prostituitinoj. Prostituado en Germanio estas laŭleĝa.
*Pri la seksum-pozicioj oni ne parolis.*

# SENVORTA VIVO













**Senvorte**



**el**

**Portugalio**





## Ĉu komencas nova epoko?

**Ekde la historia konscio ĉiam pli ĝeneraligis, ke ĉiu generacio inklinas rigardi la tempon en kiu ĝi vivas tre grava. Precipe ĉe ŝanĝoj de jarcentoj, eĉ ĉe jarmiloj, la formallogike pensanta homo, volas ordigi la tempon, por kapti la trarigardon. Tamen ni ne forgesu, post ĉiu redukto al homa kapableco, ke la reala tempo okazas tutamplekse kaj sendepende ankaŭ de niaj ordigoj.**

La elekto de Obama kiel Usona prezidanto estis la pinto de evoluo de demokratio en la ĝis tiama historio en la mondo. Ke tio ne estis nur hazardo, plifortigis la popolo eĉ kun la dua foja elekto. Pli ol dufoje, pri la principo de la usona demokratio, neniu estas reelektebla.

En funkcianta demokratio ekestis nova prijuĝneceseco de politikaj cirkonstancoj. Montriĝis ke post iu tempo en la socio submetiĝis establismo de potenculoj kiuj bremsis la pluevoluon. En tiu situacio kaj tempo ĉiam gravas ĝusta reago kun necesaj ŝanĝoj, ke ekstremuloj ne ricevas sian ŝancon.

En la historio jam kelkfoje okazis, ke diversaj revolucioj, kiel naciismo, komunismo, ktp., subfosis la demokratan evoluon de la socio. Nuntempe minacas ankaŭ diversflanke, ekz. en Usono de rasistoj, en Francio de naciistoj, en Germanio de Afd-partio, kaj Europon ĝenerale de la nacionalismo.

La usonaj balotoj rezultis la malkontenton de la popolo al la sinteno de la elita establismo. Donald Trump ***ruze*** eluzis tiun animstaton de la civitanoj kaj kun simplaj senperaj sloganoj atingis la povon. La demando estas nun kiel li uzos tiun. Ĉu li sukcesas ripari la alparolitajn devojiĝojn, aŭ kun lia revolucia elano, estos mem la demokratio, (kiu lin al povo helpis) endanĝerigita ?

La historian evoluon de la demokratio, neniu en la mondo povas finigi, nur eble kelktempe rehaltigi. En la historio jam kelkfoje okazis revoluciaj disrompiĝoj de la establaĵoj kiuj volis bari la pluevoluon de la socio. Sed la rezulto estis en la pasinteco ĉiam nur la inversigo de la regado kaj la subpreno.

Nuntempe estas novo, kion ni devis lerni el la 20a j.c., ke la revolucioj ĉiam supertrafis la celon kaj ili pli da disrompis ol alkonstruis. Tiu sperto ŝanĝis necese nian tutan pensmanieron. Gravas ke ankau decidpovaj politikistoj tion konsciiĝas.

Eble Trump, povas sekvi Gorbaĉov en lia pensmaniero (ankaŭ se nuntempe preskaŭ neniu konfidus lin tion). Sed tiudirekte li jam kelkfoje esprimiĝis. Kaj eble valorigos la supozo de Gorbaĉov, kiel li diris en intervjuo; „eble estas eĉ avantaĝa se Trump ne havas spertojn en la politiko“.

Oni povas nur supozi kion pensis Gorbatŝov malantau tiu eldiro. Unu certas, li, kiam estis unu de la plejpotencaj personoj en la mondo, pensis pri la „nova pensado“, tion li esprimis ankaŭ en lia libro „Perestrojka“. Kaj pro tio ankau ne estis hazardo, ke nin esperantistojn, AIS-anojn, audienciis en Moskvo.

Aparte de la multaj dubindaj eldiroj de Trumpf, li alparolis ankaŭ multe da veraj problemoj en la establisma socio, kiu ne nur en Usono, sed ankaŭ mondvaste ricevas aŭdon. Tre interesa estas ke li mem, kiu apartenas al la alt-kapitalista socio, kritikas la propran klasapartenecon.

De tio estas eble sekvebla, ke li superpaŝis la partiligitecon kaj serĉas pli iu ĝenerala vero, kio ne malbonas en tiu pozicio. Jes, li jam estas ankaŭ sufiĉe aĝa kaj sufiĉe riĉa, li ne plu bezonas batali por materiaj bonaĵoj kaj povas sin permesi pledi por pli altaj valoroj. Ni lasu nin surprizi, tamen apud de ĉiu kritiko.

Li mem kritikas la bankojn, la neoliberalisman kapitalinvestojn kaj la militan intervenon de Usono en diversaj landoj kaj volas malfortigi la Nato. Eble tio eĉ ne estas la plejmalbona por Europo, ke niaj nacional(***idi-ote***)pensantaj politikistoj komencus europece ion konkretan fari. Ke Europo estiĝu memstara, unuece en diverseco, kiel tio estis bele formulita, sed malmulte konkrete farita tiudirekte.

La batalo de Trump kontraŭ ĵurnalistoj kaj la nuntempa distordiĝo de informado, havas multe veron en lia kritiko. Se ni nur prenas kiel ekzemplon la leĝo pri la, deviga pago de radio kaj televidprogramoj en Germanio, ekkoniĝas la unuflankan limigon la informadlibereco.

Memkompreneble tion eluzas la dekstraj partioj kiel Afd, ĉar kontraŭ tiu, tv-radio leĝoj estas multe da voĉoj el la popolo ricevebla. Simila estas la stato kun la migrantoj. La problemo estis jam antaŭ kelkaj jaroj ekkonebla, sed la klasikaj partioj en iliaj inertecoj ne reagis leĝe adekvate.

Nun minacas forgliti la problemo el la leĝe kapteblaj kadroj kaj donas materialon al ekstremdekstruloj. Eŭropo devas resti malferma plue por azilpetantoj, sed ne por postulantaj kiuj ne volas adaptiĝi al ĉirkaŭa kulturo kaj kelkaj eĉ volas sekrete enŝovi teroristojn en la libera europa socio.

Trump promesis la solvon ankaŭ por mondvasta terorismo kaj volas ekstermi la politike ekstreman islamismon el la mondo. Por tiu intenco li ricevis multe da subteno, ne nur en Usono, sed ankaŭ mondvaste.

Mondvaste pli malmulte da kontento ricevis la multfoja emfazo, plifortigi kaj pligrandigi la usonan nacion. Ĉe tiu postulo estis iu malagrabla naciismo rimarkebla. Naciismo kiu al usona historio tute ne taŭgas.

Ĉar usonon faris granda, ĝuste la internacieco, post kiam europon la naciismo peris en la katastrofo de militoj. La plej bone edukitaj kaj kapablaj homoj, forlasis Eŭropon kaj enmigris al Usono, helpante surkonstrui novan civilizan mondon, kun demokratia socio.

Nun, tre malbone sonas, se Usono devas de la internacieco retiriĝi, (eble eĉ forlasi la UNOn) kaj koncentriĝi nur al la propra „nacio“ (kiu feliĉe, en la klasika senco tute ne ekzistas). „Ni estas unu nacio. “ La eldiro ne nur, ke ne bone sonas en Usono, sed estas tute anaĥronisma. Nuntempe ankaŭ tutmonde, ĉar la klasik-idealismaj atendoj de nacioj fakte neniam kaj nenie en la mondo estis sukcese plenigitaj.

Al kio Usono povas fieri (se iu ankoraŭ volas uzi tiun klasik-stultan nocion), ke ĝuste ili superpaŝis kaj subigis unue la la klasikon en la socio (kaj en la arto). Usono pluevoluigis la atingaĵoj de la Franca Revolucio, la demokration, sen nacionalismo, nuligis la nobelulajn privilegiojn kaj enkondukis unu lingvon.

Sed Trump emfazis en sia parolado ankaŭ iun „oldan saĝecon“ (kiel li diris), nur bedaurinde li reduktis tiun al armeo, soldatoj kaj patriotoj, ke „egalas ĉu ni estas nigraj, brunaj au blankaj, ni sangas ĉiuj la ruĝan sangon…“ (eble pli vere ol patriotoj) …de la homaro.

Eble pro lia nestabileco kiel li estis prijuĝita, li kapablas kaj pretas fari ion klasike nekonvecionalan paŝon al malarmado kaj sekve al la mondpaco. La rilaton al Rusio li volas renovigi, la militon en Sirio fini kaj la terorismon kun forto kontraŭbatali.

La novajn paŝojn, kun nova pensado, en la politiko, kiu antaŭ kelk-jardekoj kun granda espero komencis, denove aktivigi kaj daŭrigi, estus jam granda sukceso, post la lasttempa stagnado. Sed kiel montriĝis en la estinteco, kontraŭ la malstrekiĝo kaj dialogika mondpaco, staras fortaj intersoj de establismoj, kiuj el la nuna stato tiras grandan profiton.

Tion staton nuntempe ŝanĝi necesas forta autoritato, kiu staras ekstere de la klasike interesa komunumo de la establismaĵo kaj agas internacie nur por la demokratia bonfarto de la homaro (eble kiu siatempe estis Gorbaĉov).

Steinmeier (la nuna germana ekstera ministro) plejverŝajne la nova prezidanto - diris, ke nun komencas nova erao. Ĉu? Ni estu scivolemaj kiel tio okazos kaj lasu nin surprizi, pri la eldiro: Kredu al tio, ke ĉiu tempo kion ni ricevas estas por evoluo kaj pliboniĝo, alie Dio ne lasus nin ekzisti.

*Eugeno Macko*
*Eŭropa-Demokratio-Esperanto*

# Kial Usono fariĝu JAPANIO

(el malantaŭa numero)

de Barry Friedman

Mi finfine parolas kun viva homo. "Saluton, mia nomo estas anonim-delikatsent-grumblem-dorlotit-bubaĉo kiu ne scias kiel ŝanĝi pneŭon ... Mi havas problemojn kun la kriko kaj ne povas ŝanĝi la pneŭon mem. Ĉu vi povas sendi iun por ŝanĝi la pneŭon por mi?" "Certe, tio ne estas problemo, sinjoro. Mi nur bezonas vian polisan nombron. "Mi elprenas ŝiman kaj ŝiritan kopion de mia asekur-karto kiu montras la polisan nombron, identiĝan nombron, jaron, manufakturiston, kaj modelon. La polisa nombro estas absurde longa, "123456789S kiel sendiaj komunistoj, kiel en Ekonomia reakir-plano por Soveti-Mond-Superpotenco, 458." "Bone, dankon. Kaj ĉu vi estas en sekura loko?" "Jes, en mia enveturejo. Ĉu tio estas sufiĉe sekura por vi?" "Jes, tio estas tre sekura." "Sed iu drog-konfuzita maniulo, kiu ricevas sian fidrogojn de Meksiko, kiu sendas ilin al Usono, laŭ nia nova Prezidanto, povus rabi min dum mi estas en mia enveturejo, ĉu ne?" "Mi ne scias pri tio, sinjoro. Mi nur volas scii se vi estas en sekura loko." "Tiom sekura kiel oni povas esti en la mondo." "Bone, ni sendos iun tien." "Mi supozas, ke ŝi ne komprenis mian spritaĵon. Ho nu, ne ĉiu havas Salvador-Dalí-similan senton de ĉiama ironio kaj absurdeco, Camus-o kaj Sartre-o kaj Tom Stoppard-o kaj Steve Martin-o ne povas tuŝi ĉiun pensmanieron en la konstelacioj en la universo kaj en ĉiuj planedoj kaj steloj kaj sun-sistemoj en la galaksio.

Mia patro kaj mi atendas 45 minutojn por la serva persono alveni por simple ŝanĝi pneŭon. Ni estas irititaj. Ni malsatas. Ni diskutas kie ni manĝos poste tiun tagon. "Ĉu vi volas la hindan bufedon?" mia patro petas. "Ne, hinda manĝaĵo estas tro spica kaj butera. Diareo. Kial vi opinias ke ili ĉiam surportas vindotukojn sur siaj kapoj? Ne estas por modo." "Bone, ĉinoj?" "Mi preferas simple aŭdi mian patrinon paroli dum unu horo ol esti proksime ĉina kuirejo." "Bone, estas turka restoracio nomita Café Enver Paŝa kaj Mustafa Kemal disbatas la malpurajn Armenojn kaj Grekojn trans la strato?" "Ĉu meleagraĵo estas servita en tia restoracio?" "Mi opinias ne. Estas tie ŝafido kaj kaboboj kaj sovlako kaj baklavo." "Tio estas stulta. Ili servu meleagraĵon en turka restoracio." "Kie do ni manĝu tiam?" "Dankon al Dio estas apude la Danku-Dion-ke-nun-estas-vendreda restoracio." "Bone, ni iros tien tiam, kiam la pneŭo estos ŝanĝita." La riparisto alvenas; blua kapuĉo kun Miĉigano en grandaj aŭdacaj oraj leteroj benditaj sur la fronto. Kuraĝa homo en Ohio. Kalva, ruĝa barbo, tre kiel vikingo venkanta kaj rabanta kaj seksperfortanta la novajn terojn. Sed li estas ĉi tie por ŝanĝi pneŭon. Li ekzamenas la krikon kaj poste penas kun sia propra kriko.

"Jen la problemo, amikoj. La enveturejo de via enveturejo kaj la pozicio de la aŭto igas, ke neeblas por mi ŝanĝi la pneŭon. Eĉ kun mia kriko. Vi devos trovi alian homon posttreni ĝin. Mi bedaŭras pri tio. Tio ne estas mia kulpo. Ĝuu la belan tagon." Mia patro estas furioza.

"Atendu minuton. Vi estas diranta ke ni atendis 45 minutojn por vi kaj vi venis ĉi tien kaj vi ne povas fari ion? Tio estas freneza! Kia kaculo vi estas?"

"Ho, mi nur diras al vi, sinjoro, ke pro da angulo de aŭto estas nenio, kion mi povas fari pri tio. Multe mi bedaŭras."

"Jes, bone, mi procesos kontraŭ la asekuran kompanion pro ĉi tio! Ili ne povas fari tion al siaj klientoj! Sendi iun ĉi tien kaj li ne povas eĉ ŝanĝi la pneŭon! Kio estas la kialo eĉ havi asekuran polison?! "

" Nur posttrenu ĝin al loko por priservi ĝin, poste akiru novan pneŭon, ĉio tiam estos bona."

"Ne diru al mi tion, nun vi nur foriru."

**(daŭrigota)**



# VERA VIVO




Neniu el la dek plej riĉaj virinoj de la mondo ellaboris sian riĉecon. Ĉiu el ili heredis monon de sia edzo, unu el la gepatroj aŭ aliaj parencoj.




**Lastatempaj studoj montras, ke la ulo, kiu dormis kun almenaŭ dudek virinoj - estas pli imuna al prostatkancero.**

Ankoraŭ nur dudek kaj mi ĉesos timi



Se vi volas ŝanĝi la mondon - faru tion dum vi ankoraŭ estas fraŭlo. Post la geedziĝo, vi ne povas eĉ ŝanĝi la kanalon sur la televido.

Aŭskulti edzinon similas legi la regulojn de la programaro. Vi komprenas nenion kaj akceptas ĉion ĉiuokaze.

Ŝako estas la sola ludo kiu reflektas la dividon de roloj en geedzeco. Kompatinda reĝo povas fari nur unu paŝon, dum la reĝino faras kion ŝi volas.

Ĉiuj viroj estas kuraĝaj. Hororoj ne timigas ilin. Sed la kvin maltrafitaj telefonalvokoj de edzino igas ilian panikon.

DEMOTYWATORY.PL

**Kvar geedzecaj veroj, kiuj konas ĉiu edzigita ulo.**




**Mi estas virino.**
**Mi ne scias kion mi deziras, sed..**
**mi furioziĝos, se mi ne ricevos tion.**




Amindumado - tempo kiam fraŭlino taksas, ĉu sukcesos trovi pli bonan kandidaton por edzo




**Amindumado - tempo kiam fraŭlino taksas, ĉu sukcesos trovi iun pli bonan**

# ENIGMA VIVO

## FREŜA MAGIA KVADRATO

nur por tiuj, kiuj ŝatas pensi ! aliaj - lasu ĝin

1. izolil' en elektraj aparatoj.......
2. ŝpinili, konukli ......................
3. aĵ' ........................................
4. ne povanta esti ....................
5. em', instinkt', tendenc' ..........
6. giganto el greka mitilogio .......


| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | |
| 2 | | | | | | |
| 3 | | | | | | |
| 4 | | | | | | |
| 5 | | | | | | |
| 6 | | | | | | |

**Kiumaniere solvi krucvortenigmon ?**

Unue oni devas iomete pripensi !
Por ke solvado estu pli klara - enskribu majuskle literojn! Per sageto eniru kvadrateton kaj musklaku ĝin (per maldekstra puŝbutono).
Enskribu ĝustan literon de la vorto kaj iru al sekva kvadrateto. Enskribu sekvan literon kaj iru ... ktp, ktp.
Por kontroli ĝustecon de magia kvadrato - iru al la lasta paĝo... SED...
Unue vi devas iomete pripensi...



**Unu el demandoj dum la testo por lernantoj de la unua klaso de bazlernejo en Honkongo**




**Kiu numero estas sub aŭtomobilo ?**

*Por respondo - 20 sekundoj*

**Ĉu vi jam solvis ĉi tiun infanan enigmon ?**

$$9-3\div\frac{1}{3}+1=?$$

DEMOTYWATORY.PL

**Ankaŭ simpla enigmo...
Nu... ne por ĉiuj...**

# HUMURA VIVO


Ĉu vi suferis survojan akcidenton?
Ne, mi forgesis mian geedziĝan datrevenon
Antonio Perera.


Sinjoro instruisto se vi ne traspasas mian ekzamenon, morgaŭ mi alŝutos ĉi tiun foton ĉe fejsbuko.


.....kaj se vi ne resendas ĉi tiun leteron al viaj geamikoj, proksimume dudek el ili, vi havos malbonan sorton dum pluraj jaroj.


Alveni malfrûe
Alveni ebria
alveni kun makuloj el lip-ruĝo
¡Croc! ¡Croc!
paisdelocos.com


Eva tio ne estas salato, ĝi estas mia malpura vesto.


ho! kia bona okazo

# JUDA VIVO

**S-ino Markoviĉ** promenis sur la marbordo kun sia nepo. Subite granda ondo venis kaj enakvigis la trijarulon.
"Granda Dio!", kriis la virino. "Se vi savos la etulon mi faros ĉion, kion vi volos. Mi pliboniĝos, mi donacos monon al bonfarado, mi iros al la sinagogo. Bonvolu, Dio, redonu lin!"
Tiumomente la ondo "reverŝis" la knabon, kiu ekstaris sekure sur la sablo. La avino rigardis lin atente kaj levis manojn al la ĉielo.
"Bone!", ŝi kriis. "Sed kie estas lia ĉapo?"

**"Civitano Rabinoviĉ** (= tipa juda nomo)", demandas la viz-oficisto, "kial vi volas forlasi nian landon, la plej bonan landon en la tuta mondo?"
"Mi havas du kialojn", respondas la judo. "La unua estas ke kiam mia rusa najbaro trodrinkas, li frapas al mia pordo kaj kriegas: "Kiam ni detruos la sovetan reĝimon, ni detruos ankaŭ vin, la judojn". "Mi ne volas atendi ĝis tio okazu."
"Ne zorgu plu", ridetas la oficisto. Tio neniam okazos, nia soveta reĝimo neniam detruiĝos."
"Tio estas mia dua kialo", respondas la judo.

**Juna Sami Moskoviĉ** (=juda nomo) anoncis al sia patro ke li decidis edziĝi.
La surprizita patro demandas lin: "Al kiu vi intencas edziĝi? Ĉu al la bela fraŭlino Rozenkranc (=juda nomo)?"
"Ne, paĉjo."
"Eble al la tre riĉa fraŭlino Finkelŝtein (= juda nomo)?"
"Tute ne, paĉjo."
"Al kiu, do?"
"Al Rosie O'Grady, nia najbarino."
"Al tiu *ŝikse* (gojino, ne-judino)?" kriegis la ŝokita patro. "Kial vi ne povas edziĝi al bona juda knabino?"
"Ĉar", diras Sami, "ĉiuj miaj amikoj edziĝis al tiel nomataj "bonaj judaj knabinoj" kaj mi tion ne volas. Tiuj bonaj knabinoj la tutan tagon plendas. Ili havan kapdoloron kaj stomakdoloron, aŭ pieddoloron aŭ dorsdoloron, aŭ okulproblemojn aŭ dentproblemojn."
"Ĉu vi opinias", kriis s-ro Moskoviĉ, "ke la *ŝikse* ne havas dolorojn?"
"Kompreneble ŝi havas", respondis Sami. "Sed ŝi ja estas *ŝikse*, do kial zorgi?"

**En iu orienteŭropa juda vilaĝo** mankis junaj homoj liberaj al geedziĝo kaj oni devis importi ilin el aliaj vilaĝoj.
Unufoje edziĝonto estis atendota sed pro eraro du estontaj bopatrinoj iris al la trajna stacidomo por ricevi lin.
Ambaŭ argumentis ke la ĵus alveninta junulo apartenas al ŝia filino, kaj fine la afero atingis la tribunalon.
Kiam la juĝisto aŭdis pri kio temas li diris:
"Ni tuj solvu la problemon laŭ la metodo de la biblia reĝo Salomomo: Prenu tranĉilon kaj distranĉu la junulon. Ĉiu el vi ricevos ĝuste duonon de li."
La unua virino diris:
"Bonvolu konservi lin. Mi preferas cedi."
Sed la alia diris: "Bonege, distranĉu lin tuj!"
Aŭdinte tion-ĉi la juĝisto diris:
"Redonu la junulon al la dua virino. Ŝi estas la vera bopatrino!"

**Sinjorino Ben-Baruĥ**, al sia gastino:
"La familio de mia edzo devenas de la reĝo Davido. Kie komenciĝas la genealogia arbo de via familio?"
Gastino: "Tio ne estas klara ĉar la donitaĵoj de mia familio perdiĝis en la Diluvo."

**Juda rabeno kaj katolika pastro** veturas trajne en la sama kupeo.
Subite diras la pastro:"S-ro rabeno. Mi scias ke via religio ne permesas al vi manĝi porkaĵon. Sed ĉu vi vere neniam gustumis tion, almenaŭ unu fojon?"
Respondas la rabeno: "Mi diros al vi la veron, kolego. Unu fojon, antaŭ multaj jaroj, mi gustumetis porkaĵon."
Pasas 10 minutoj.
Subite la rabeno demandas la pastron: "S-ro pastro. Mi scias ke via religio ne permesas al vi edziĝi. Sed ĉu vi vere neniam provis esti kune kun...?"
La pastro interrompas lin: "Jes, mi scias kion vi volas demandi. Mia respondo estas jesa: unu-du fojojn mi pasigis tempon kun virino.
Post 5 minutoj diras la rabeno al sia najbaro: "Nun konfesu: ĉu tio ne estis pli bona ol porkaĵo?"



**Solvo de magia kvadrato:**
**1. ebonit' 2. bobeni 3. objekt'**
**4. neebla 5. inklin' 6. Titano**

**Numero: 87**

**Simpla enigmo: 1**




**Russel Stuttler**
**Tofu Restaurant in Kyoto, Japan**